



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

Subtenu Pilo-Press

Abonu PILO -

eldonaĵojn!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Abonprezo 30,- GM

N-ro 31/77 - 9 aŭg 1977
Aperas ĉiusemajne

Ĝenerala Direktoro de UNESKO ĉe UK en Rejkjaviko

Rejkjaviko (pp) - "La rajto je komunikado" estis la temo de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 30.7. ĝis la 6.8.77 en la islanda ĉefurbo.

La enkondukan paroladon dum la kongresa inaŭguro faris la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, la senegalano Amadou-Mahtar M'Bow. Li raportis pri la klopodoj de sia organizaĵo ~~per~~ internacia konvencio nove difini la "rajton je komunikado". En ĝi devas kaj esti respektata la kultura diverseco de la popoloj kaj ankaŭ rekonataj la neceso de intimaj ligoj inter ili.

Laŭ Amadou-Mahtar M'Bow UNESKO volas atingi ke la ekzistantaj ebloj al internacia komunikado estu utiligataj laŭ pli bone ekvilibrita maniero. En la universala interŝanĝo de komunikado devus aŭdiĝi antaŭ ĉio tiuj landoj kiuj disponas pri malpli alte evoluigitaj komunikaj rimedoj. Komunikado estas forto, eble eĉ la forto, opiniis la parolanto. Necesas do, laŭ li, forigi la malekvilibron en la komunikada fluo inter la diversaj kulturoj.

Sur la kampo de la internacia komunikado la lingva demando ludas ege gravan rolon, opiniis la Ĝenerala Direktoro de UNESKO kaj rekonis, ke la Universala Kongreso de Esperanto starigis al si la taskon pritrakti speciale la lingvajn aspektojn de komunikado.

La kongreson partoprenis pli ol 1000 homoj el 40 landoj.

Novelekto de la UEA-estraro

Rejkjaviko (pp) - La komitato de UEA dum siaj kunsidoj kadre de la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko elektis novan estraron.

Prof. d-ro Humphrey Tonkin, USA, estis reelektita kiel prezidanto de UEA. Vicprezidantoj fariĝis magistro William Auld, Skotlando, kaj prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Norvegio.

Kiel nova ĝenerala sekretario de UEA estis elektita la ĝisnuna vicprezidanto, d-ro Werner Bormann, Hamburg, F R Germanio.

Kiel membroj apartenas al la estraro: S-ino Ursula Grattapaglia, Brazilo; s-ino d-rino F. Szabó-Felsö, Hungario; s-ro Gregoire Maertens, Belgio, kaj s-ro Andrzej Pettyn, Pollando.

Salutoj el Rejkjaviko

Nürnberg (pp) - PILO-PRESS ricevis salutojn el Rejkjaviko de pastro Kindler-Triksini kaj s-ino Verena Gass. "La universala kongreso estas sukceso", skribis Triksini.

Thomas Bormann, Hamburg, sendis al ni la germanlingvan gazetaran bulleton pri la elpaŝo de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO dum la kongresa inaŭguro.

Kongresaj senraportoj

Varsovio (pp) - Pola Radio Varsovio elsendos senraportojn pri la UK en Islando en la venontaj tagoj, ĉefe dum la Esperanto-Ekspresoj. Aŭskultu kaj skribu al la redakcio!

Gvidrezolucio de la SAT-kongreso

Augsburg/Parizo (pp) - Kiel ni jam raportis la 50-a SAT-kongreso okazis de la 30.7. - 5.8. en la bavara urbo Augsburg. Ĉi-sekve ni publikigas la oficialan prikonferan informon de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT):

"En la fino de la tria laborakunigo la Kongreso de SAT akceptis unuanimen la ĉi-suban Gvidrezolucion kiel gvidilo por la estonta laboro. La kongresanoj trapasis en harmonia etoso belegan semajnon, kiu estis plenigita ne nur de kunsidoj, sed ankaŭ de interesaj prelegoj (5) kaj du ekskursoj, el kiuj la tuttaga kondukis al la Bavariaj Alpoj. La unua (al la lupolregiono) finiĝis en Pfaffenhofen, kie la loka grupo aranĝis festprogramon kaj salutparolis la bavara ministro por agrikulturo. Urbestro prof. Fischer parolis dum la Malfermo en la Urbodomo, kie li ankaŭ akceptis poste reprezentantojn de la movado. TESPA (la pariza Esperanto-teatro) prezentis kvinaktan dramon "La Justuloj" de A. Camus, kiu rikoltis merititan aplaŭdon. Sukcesas kongreso dank' al sperta organiza komitato. La venontsomera kongreso okazos de la 13. - 20. junio 1978 en Lekturo (Lectour), en sudokcidenta Francio.

Gvidrezolucio

La 50-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta en Augsburg, Germanio, de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1977, kiu kunigis preskaŭ 300 laboristajn esperantistojn el 18 landoj, post diskuto kaj aprobo de la raporto

konstatas, ke la tutplaneda homa vivo estas pli kaj pli malfacilita pro monaj kaj aliaj gravaj problemoj, ĉiam ligitaj al la ekonomio de la nuna socio, kiuj perturbas la vivnivelon, foje endanĝerigas la pacon internacian kaj - en la kazo de atomenergio - vekas sekurecajn, financajn kaj moralajn problemojn tute ne solvitajn. Kompreneble nia kongreso ne povas prezenti solvon, sed povas sugesti al ĉiuj membroj, ke ili klopodu disvastigi homecjan ideojn, kiuj kondukas al:

- a) mond vasta malarmado, kiu havus valoran spiritefikon, kaj donus financan eblecon por grandiozaj entreprenoj, ekzemple: akvumado de dezertoj aŭ uzo de naturaj fortoj;
- b) malapero de landlimoj. Ĉi tiuj disigas la popolojn favore al superaciaj firmoj kaj bankoj;
- c) lukto kontraŭ rasismoj kaj ŝovinismo ĉiuspecaj kaj ĉiukoloraj, kiuj danĝere baras mensevoluon de la popoloj;
- ĉ) batalo por garantii la plenumon de Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, kaj la decidon de la Helsinki-konferenco.

Apogas la kampanjon por Enkonduko de Esperanto en aërtrafikon, kie la konfuzo pro pluraj lingvoj povas okazigi katastrofojn.

Gratulas la mond civitanojn, kiuj en sia kongreso en Parizo en julio 1977 entuziasme akceptis Esperanton kiel mond lingvon de la Terfederacia Konstitucio de la mond civitanoj.

Reasertas, ke nia asocio estas laŭstatute peresperanta organizo, kies rolo estas antaŭ ĉio helpi al realigo de la klasaj celoj de la laboristaro kaj konstanta plialtiĝo de ĝia kulturenivelo. Por tion efektiviĝi la kongreso petas, ke la LEA-komitato rekomendu al siaj membroj pli sisteman aplikon de la gotenbarga konvencio kaj konforme al tiu ĉi pli intiman kunagadon - interalie - en la kontaktoj kun la diversaj sindikatoj, partioj, aŭ asocioj progresemaj kaj en la propagando por Esperanto praktike utiligata por faciligi fratecajn rilatojn inter ĉiuj laboruloj de la mondo.

Alvokas la anojn de SAT kaj ĉiujn progresemajn esperantistojn, ke ili informu pri la junulfako pere de La Juna Penso, kaj ke ili subvenu la aktivecon de la JF ne nur morale aŭ finance, sed ankaŭ per varbado kaj materia helpo, tiel ke la JF povu pli sukcese realigi sian akceptitan agadplanon.

Petas, ke la membroj sentu sin respondecaj por la antaŭenigo de la

ideoj kaj sugestoj esprimitaj en tiu ĉi rezolucio, kiu fariĝu nia gvidilo dum la tuta jaro."

La Justuloj en Augsburg

Augsburg (pp) - Dum la SAT-kongreso en Augsburg la "Teatro Esperanto de Parizo" (TESPA) prezentis la teatraĵojn "La Justuloj" de A. Camus. Pri la prezentado skribas Gerald Tucker, Augsburg:

"Malgraŭ iom malfacilaj kondiĉoj (lumo, akustiko, teknikaj) la franca trupo TESPA, t.e. Teatro Esperanto de Parizo, prezentis vidindan teatraĵon.

En la unua akto verŝajne pro la malfacilaĵoj ankoraŭ mankis la iluo. La dua akto estis pli forta. La neatendita, timita kortuŝiĝo, kiu hezigitas la atenconton Janek kaj savas la granddukon, estas konvinke prezentita de Anno Lagrange, kiu ekde ĉi tiu akto konsekvence portis la etoson. Bonege lin subtenis Solen' en la rolo de la inteligenta kaj sentema Dora Duboleva.

En la rolo de la komence gajspirita kaj nekomplika Aleksej Voinov, Mikael Cavelan efike montris la malesperon de la maltrafita tempopunkto detruinta la elanon kaj la ekvilibron ĉe la dua atencoprovo. Precipe en ĉi tiu tria akto la geaktoroj demonstris sian kapablon koncentriĝi, kiam ekstere bruis kaj ridegis laŭtuloj, verŝajne konsciante nenion pri la okazanta aranĝo.

Kreŝo Barkovic (Boris Anenkov) enkorpiĝis celkonscian sed kompreneman konspirestron, dum Georgo Lagrange (Stepan) efike rolis kiel amariĝinta, malaplenna suferinto kaj kiel grumblema gardisto.

Resume konstatindas ke ĉiuj gerolintoj, do ankaŭ Bernardo Grosgeorge (Foka), Michel Delatte (Skuratov) kaj Sylvie Bonnet (la granddukino) malgraŭ akustikaj malfacilaĵoj scipovis krei atentokaptan kaj atentoretenan atmosferon sur la simple sed lerte dekorita scenejo.

Ilia komuna ensceniĝo estas laŭdinda."

29-a Internacia KELI-Kongreso

Edinburgo (pp) - 90 personoj partoprenis la 29-an Internacian Kongreson de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kiu okazis de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1977 en Edinburgo.

En la ĉefa preĝejo de Skotlando, la Katedralo S-ta Giles, okazis speciala Diservo memore al la fakto, ke antaŭ 50 jaroj en tiu domo estis sole ne anoncita la baldaŭa apero de la tuta Biblio en Esperanto. Ĉeestis skota pastro, kiu tiam partoprenis pro scivolo, ne sciante Esperanton; intertempe li fariĝis esperantisto.

Grandioza kultura programon travivis la 90 kongresanoj en la najbara urbo Stirling, kie havis lokon la antaŭkongreso de UEA. Sub gvido de William Auld, en kolorpumpa skota kilto, prezentis sin multaj artistoj, ĉefe per muziko; Marjorie Boulton deklamis proprajn poemojn.

La KELI-kongreso okazis en ejo de la Edinburga universitato, kun vigla kontakto - dum ĉiuj manĝoraj - kun aliaj grupoj. Multaj kongresanoj utiligis la okazojn por informi pri Esperanto.

La jarkunveno de KELI decidis rezigni pri propra kongreso en 1978 kaj anstataŭe rekomendi al siaj membroj aliĝon al la Universala Kongreso en Varna, Bulgario.

Nova ORE-delegito

Hannover (pp) - La delegito de Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) por Federacia Respubliko Germanujo nun estas: Richard Wluka, Bremer Str. 8, D-3000 Hannover 21; p&k. Hannover 1831 21-300. Jara kotizo estas 12,- GM; ORE-organo estas "La Mevo", kiu aperas jare kvarfoje.

Tri IL-rilataj stratoj en Frankfurto

Frankfurt/M (pp) - En la Frankfurta kvartalo Sachsenhausen okazis la 30-an de julio la inaŭguro de tri stratoj dediĉitaj al la Internacia Lingvo: Esperantostrasse, Ludwig-Zamenhof-Weg kaj Carl Barthel-Weg (laŭ la fondinto de la Esperanto-Societo Frankfurto kaj bona konatulo de Zamenhof). Ĉeestis ĉ. 40 esperantistoj, inter ili grupo da gejunuloj el Israelo, kiu survoje al la TEJO-kongreso en Poitiers, Francujo, haltis en Frankfurto por rigardi la urbon kaj pluvojaĝi ferveje ĝis Majenco kaj de tie ŝipe al Kolonjo.

Esperanto-Strato en Kerpen

Kerpen (pp) - Laŭ informo de s-ro Johann Thelen, leganto de Eŭropa Esperanto-Revuo en la urbo Kerpen antaŭ nelonge ia ĝisnuna "Schulstrasse" estis nomumita "Esperanto-Strasse". Parto de la nova urbo Kerpen proksime al Köln estas ankaŭ Horrem, kie ekaperis siatempe "Esperanto Triumfonta" (Heroldo de Esperanto).

Internacia migrado

Freising (pp) - Sabate, la 20-an de aŭgusto, en la bavara urbo Freising proksime al München okazos "internacia migrado". Invitataj estas ankaŭ migremaj esperantistoj por formi esperantistan migrad-grupon. Aliĝkotiĝo estas 6,50 GM (por medalo), la distanco estas 10 km, oni renkontiĝos ĉe la stacidomo en Freising inter la 9,30 kaj 10,00 horo. Post la migrado la esperantistoj renkontiĝos en la "1-a Esperanto-restoracio en Bavario": Deutsches Eck (Germana Angulo), Schwanthaler Str. 58, München 2. Interesuloj aliĝu ĉe: Johann Andreas Pachter, Vöttinger-str. 49/50, D-8050 Freising 11, laŭeble ĝis la 18.8.77.

Esperanto en radio kaj televido

La Dua Germana Televido (ZDF) filmis en Hamburg kaj Augsburg por prepari filmon pri Esperanto. En Augsburg oni filmis mallongajn scenojn el la teatraĵo "La Justuloj", ludita dum la SAT-kongreso. La filmo estos montrita en la venontaj tagoj kadre de la programo "Drehscheibe".

Elsbeth Bormann, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, estis intervjuita de Nordgermana Radio okaze de la 90-a datreveno de Esperanto. La intervjuo estis disaŭdigita la 27-an de julio 1977.

Klubo de Esperanto-DX-anoj

Radio Svedujo en Stokholmo raportis en la elsendoj por la DX-anoj (elsendoj ĉiumardaj je la horoj 11,30/18,30/21,30 kaj 23,30 MET), ke estis fondita klubo de la Esperanto-DX-anoj en F R Germanujo. Kaj tio estas vere fakto. Prezidanto de tiu DX-klubo estas la samideano d-ro J. Kondor, Alte Schloss-Str. 25, D-5450 Neuwied. La taskojn de sekretario transprenis s-ano Günter Conrad, Kafkastr. 48, D-8000 München 83.

La aŭskultado kaj korespondado estas jam tre ampleksa, ekz. kun jenaj radio-stacioj: Albanio, Britujo, Bulgarujo, Deutschlandfunk, Deutsche Welle, Sender Freies Berlin, RIAS Berlin, Italujo, Luksemburgo, Malto, Aŭstrujo, Pollando, Svedujo, Svislando, Hungarujo, Radio Vatikana. Al la radio-stacioj estas sendataj raportoj pri la kapt-eblecoj en germana lingvo kaj Esperanto. La teksto estas tajpata en komparebla maniero.

Respondis ne nur la radio-stacioj kaj sendis leterojn, QSI-kartojn kaj broŝurojn - sed - skribis jam multaj DX-anoj kaj petis informojn pri la klubo de la Esperanto-DX-anoj mem, pri la membreco kaj pri la Internacia Lingvo Esperanto. - Tiel komenciĝis la propagando de Esperanto nun ankaŭ en la vicoj de la DX-anoj en la tuta mondo, kiuj kaptas la elsendojn de la radio-stacioj sur la mallongaj ondoj.

W.K.